

La Riverego kebekia esperantista bulteno

Decembro 2007

Esperanto-Societo Kebekia

Jaro 22, No 90

Raporto de la prezidanto 2006-2007

Normand Fleury

Le mouvement espérantophone progresse lentement parce qu'il y a beaucoup à faire pour informer le public, organiser des cours et des rencontres et donner des services aux membres. Le C.A. fait ce qu'il peut et réussit parfois de bons coups comme la rencontre interprovinciale (MEKARO) en mai dernier et la participation au Forum social québécois à l'UQÀM à la fin août. L'événement de la décennie est sans contredit le Septième Congrès d'espéranto panaméricain à Montréal en juillet 2008. Une rencontre internationale à ne pas manquer !

Denove estas tempo raporti pri la agadoj de ESK dum la pasinta jaro.

Vi eble ne scias, sed la laboro ne mankas. Certe estus bone informi pli vaste, starigi pli da kursoj, organizi pli da renkontiĝoj sed ĉio tio dependas ankaŭ de via kunlaboro. Ne eblas al la kvinopa estraro ĉion fari.

Nu, jen kion ni faris. Estis regulaj kunvenoj en Montrealo kaj aparte sukcesa estis la MezKanada

Renkontiĝo (MEKARO) dum pasinta Majo. Ni aŭdis tre pozitivajn komentojn pri ĝi kaj la venontan MEKAROn transprenas la Toronta klubo.

Ni partoprenis la Ter-festivalon dum Junio kun budo sed, pli grave kaj sukcese, ni aktive ĉeestis la

***Vi eble ne scias,
sed la laboro
ne mankas.***

Kebekian socian forumon en UQÀM fine de Aŭgusto. Multaj homoj entuziasme aŭdis pri Esperanto kaj ni esperas ke tio donos iom da rezultoj.

Ni rigardu antaŭen, en 2008. La Sepa Tutamerika Kongreso de Esperanto estos certe la plej grava evento de la jardeko. Mi invitas vin tuj aliĝi kaj jam pripensi, kion vi povus fari por helpi nin sukcese okazigi tiun kongreson. Kontakti nin kaj ni certe trovos taskon kiu

povus interesigi vin. Ni krome invitas vin donaci monon por helpi pagi partoprenkostojn por LatinAmerikanoj.

Konklude mi diru, ke mi kontentas pri la agadoj de la estraro. Tamen mi ŝatus pli ofte aŭdi ion pri vi, membroj. Ĉu vi ŝatas la enhavon de *La Riverego*? Ĉu nia retejo kompletas aŭ vi ŝatus ke ni aldonu pliajn informojn? Kial vi ne partoprenas pli multaj en la klubaj vesperoj en Montrealo ?

Denove mi volas danki al Boris-Antoine Legault, kiu provis subteni la vigelecon de la universitataj E-kluboj en Montrealo. Sed li certe ne povas ĉion fari sola. Estus granda helpo se vi povus proponi aktivecon kaj organizi ĝin.

La Esperanta Kebekia movado bonvenigas vin kaj vian kunlaboron.

Movademe salutas vin,

Normando Fleury
eksprezidanto de ESK

La enreta *Riverego* 1986 -

Boris-Antoine Legault

Ĉu vi estas unu el tiuj pioniroj de Esperanto-Societo Kebekia kaj ŝatus relegi viajn artikolojn, iam publikigitajn en *La Riverego*? Ĉu vi estas nova membro, kiu volas sciigi pli pri la historio de via organizo? Sendepende de motivo, nun eblas senpage elŝuti ĉiujn pasintajn numerojn de *La Riverego*, ekde la unua (januaro de 1986), ĝis la aktuala (enretigata unu monaton post papera aperigo).

La arĥivitaj numeroj troviĝas en pdf-a formato ĉe retejo de Esperanto-Societo Kebekia (www.esperanto.qc.ca/lriverego) kaj ankaŭ ĉe nova reta projekto *La esperanta gazetejo* : www.gazetejo.org/lariverego

La *Riverego* en ligne 1986 -

Boris-Antoine Legault

Vous comptez parmi ces pionniers-ères de la Société québécoise d'espéranto et aimeriez relire vos articles, publiés jadis dans *La Riverego*? Vous venez de devenir membre de la Société québécoise d'espéranto (Bravo!) et aimeriez en savoir un peu plus sur l'histoire de votre association? Peu importe votre raison, il est maintenant possible de télécharger gratuitement tous les numéros de *La Riverego*, du premier numéro (janvier 1986) au numéro actuel (en ligne un mois après la publication de la version papier).

Les archives de *La Riverego* en format pdf se trouvent sur le site de la société québécoise d'espéranto (www.esperanto.qc.ca/fr/riverego), ainsi que sur le nouveau projet web *La Esperanta Gazetejo* : www.gazetejo.org/lariverego



**Société québécoise d'espéranto
Esperanto-Societo Kebekia**

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux : Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 0830-9574. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise avec mention obligatoire de la source. Photocopié à 90 exemplaires. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto. Rédaction : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Administrateurs de la SQE : Boris-Antoine Legault (président), Martin Benoit (vice-président), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (trésorier) et Normand Fleury (conseiller) .

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junio, septembro kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Fotokopiita 90oble. Senpage por la membroj de la ESK. Por la aliaj, la jara abono kostas 10 kanadajn dolarojn. UEA-kodo de la Societo : kebk-d. Redaktado : Jérôme Frédéric Bouchard (jero@esperanto.qc.ca). Estraranoj de ESK : Boris-Antoine Legault (prezidanto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme Frédéric Bouchard (secrétaire), Sylvain Auclair (kasisto) kaj Normand Fleury (konsilanto).

Échéance pour le prochain numéro / *Limdato por la venonta eldono* : 2008.03.01

6358-A, rue de Bordeaux • Montréal • H2G 2R8 • informo@esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

Nova Estraro de Esperanto-Societo Kebekia

Boris-Antoine Legault

La nova estraro de Esperanto-Societo Kebekia, elektita en lasta jarkunveno por dujara periodo, konsistas el Sylvain Auclair (kasisto), Martin Benoit (vicprezidanto), Jérôme-Frédéric Bouchard (sekretario), Normand Fleury (konsilanto) kaj Boris-Antoine Legault (prezidanto)

Nouveau conseil d'administration de la SQE

Boris-Antoine Legault

Le conseil d'administration de la Société québécoise d'espéranto, élu pour un mandat de deux ans lors de la dernière assemblée annuelle, est désormais constitué de Sylvain Auclair (trésorier), Martin Benoit (vice-président), Jérôme-Frédéric Bouchard (secrétaire), Normand Fleury (conseiller) et Boris-Antoine Legault (président).

Un goût du monde?

Sylvain Auclair

Depuis quelques années, le bulletin de la Société québécoise d'espéranto, *La Riverego*, ne traite que de manière superficielle des nouvelles provenant de l'extérieur du Québec. Nous avons plutôt décidé d'inviter nos membres à s'abonner à l'excellente revue publiée par Espéranto-France et nommée *Le Monde de l'Espéranto*. Principalement en français, elle traite des principaux débats et présente les nouvelles importantes concernant l'espéranto de par le monde, avec bien entendu un accent particulier sur la France et l'Europe. Le tout pour dorénavant seulement **30\$** pour six numéros (en principe un an), ce qui est — ne le répétez pas trop

fort, ça pourrait faire des jaloux — moins que ce paient les membres français d'Espéranto-France pour leur propre revue.

Nous avons cependant constaté avec tristesse que seule une minorité de nos membres profite de cette offre exceptionnelle, les autres se privant ainsi d'informations selon nous essentielles à la connaissance du mouvement espérantiste mondial. Sans doute certains d'entre vous trouvent-ils excessif de payer 30\$ pour une revue qu'ils n'ont jamais vue. C'est pourquoi nous vous proposons de recevoir **un exemplaire** du *Monde de l'Espéranto* pour un coût unitaire de cinq dollars. Il suffit

de nous faire parvenir cette somme, par la poste ou via notre site web, avec votre demande. (Cette offre est bien entendu réservée à nos membres en règle.) C'est tout simple. Il vous faudra par contre faire preuve de patience : vous pourrez attendre jusqu'à quatre mois avant de recevoir votre revue, vu les délais de production. Mais vous ne le regretterez pas.

Vikipedio : Volapük superas Esperanton, ĉu?

Sylvain Auclair

Lastatempe, ni eksciis kun kons-terno, ke Esperanto falis al la 19^a loko, laŭ nombro de artikoloj, en la listo de lingvoj en la reta multverkista enciklopedio Vikipedio (Wikipedia). Tio ne estus plej alarmiga, se oni ne vidus, ke Volapük estas en la 15^a loko, en la malgranda grupo de lingvoj kun pli ol 100 000 artikoloj. (Kontrolu mem ĉe http://meta.wikimedia.org/wiki/Complete_list_of_language_Wikipedias_available)

Tamen, kvankam aldono de kvalitaj artikoloj estas tute bona kaj donus pli belan reklamon al Esperanto, ni eble ne tro zorgu pri tio. Mi iris esplori la

volapukan artikolaron, kaj trovis NUR mallongajn klarigojn pri loknomoj, tradukitaj, eble maŝine, el aliaj lingvoj, kaj el NUR kelkaj landoj (Usono, Francio, Brazilo, Germanio, Aŭstrio, Svisio, Estonio kaj unu de Kanado).

Ni memoru, ke Volapük estas projekto de internacia lingvo naskita naŭ jarojn antaŭ Esperanto, kaj kiu fiaskis pro lingvistikaj — ĝi estis apenaŭ lernebla, eĉ de ĝia kreinto — kaj internpolitikaj problemoj.

Klaku.net : Valora aldono al esperanta retejaro

Boris-Antoine Legault

Klaku.net estas esperanta sociiga retprojekto, kiu ebligas al homoj publikigi ĉe unu centra retejo plej diversajn esperantajn artikolojn aperintajn ie ajn en la reto. Uzantoj povas ankaŭ voĉdoni (klaki) kaj komenti pri la kontribuoj, kiujn ili opinias aparte gravaj aŭ interesaj.

La projekto, inspirita de angla-lingva digg.com kaj hispanlingva meneame.net, estas aparte taŭga

por la esperanta retejaro: (el la retejo de Klaku) « Ĝis nun, la esperanta blogaro ne estis rete interkonektita. Klaku celas esti la deirpunkto el kie la reta engaĝiĝo povas kreski, [...] Klaku estas la projekto por teksti esperantan disan reton. »

Bonvole vizitu www.klaku.net kaj... Ek al klak' !

Le prix Nobel de la paix pour l'UEA?

Société suisse d'espéranto

L'espéranto permet des contacts démocratiques, car tous les locuteurs sont sur le même pied, la langue n'étant reliée politiquement ou historiquement à aucun Etat. Une langue internationale ne peut pas être une langue nationale. L'Union Européenne l'a compris en ne privilégiant aucune langue par rapport aux autres. L'espéranto est enseigné dans des camps de réfugiés en Afghanistan sous le nom de langue de la paix. Utilisée dans des camps de jeunes Japonais et Coréens, elle donne lieu à de nouveaux contacts d'égal à égal. L'espéranto poursuit les mêmes buts que l'UNESCO : circulation libre de l'information en général et avance dans les domaines de l'éducation, des sciences et de la culture. Pour cette raison, en 1954 et 1985, cette organisation mondiale a voté deux résolutions attirant l'attention sur les efforts positifs de l'Association Universelle d'Espéranto (UEA).

En 2008, l'UEA va fêter son centième anniversaire. Pour cette raison et pour les raisons expliquées plus haut, elle va être proposée pour recevoir le Prix Nobel de la Paix. Cette démarche ne peut être initiée que par des parlementaires d'États reconnus. C'est ce qu'ont fait mesdames Gisèle Ory, conseillère aux États, et Francine John-Calame, conseillère nationale de Suisse

Un don important!

Normand Fleury, comité organisateur

Comme vous le savez sans doute, Montréal accueillera en juillet 2008 le 7^e Congrès d'espéranto des Amériques (TAKE). Il s'agira d'un événement espérantophone majeur à se tenir au Québec ! Vous avez donc le temps de parfaire vos connaissances de la langue afin de vous plonger dans l'ambiance unique d'un congrès international, l'été prochain.

TAKE est un congrès qui a lieu à tous les trois ans et qui a été créé par la commission des Amériques de l'Association mondiale d'espéranto (UEA). Cette rencontre se déroule toujours dans une ville et dans un pays différents. Les congrès d'espéranto n'ont pas besoin de traducteurs et d'interprètes, car tous leurs participants parlent espéranto.

Les organisateurs du 7^e TAKE espèrent accueillir près de 200 participants. Le thème du congrès sera : « Écosystèmes, langues, cultures : diversité pour le développement durable des Amériques ». On prévoit des présentations sur ce thème ainsi que des spectacles, des excursions, un banquet et bien plus. La rencontre annuelle de l'association d'espéranto des États-Unis aura également lieu à Montréal au cours de la même période.

Le comité organisateur invite les espérantophones et amis de l'espéranto des Amériques à participer au 7^e TAKE. Nous espérons que les échanges entre les peuples

d'Amériques donneront de nouvelles idées, de nouveaux espoirs et de nouvelles amitiés qui contribueront à améliorer notre monde.

Le formulaire d'inscription se trouve sur www.take7.ca et est également inséré dans *La Riverego*. Faites vite ! Le coût d'inscription le plus avantageux est offert seulement jusqu'au 31 décembre 2007.

Nous recevons des inscriptions de participants d'Amérique latine que n'ont pas les moyens financiers pour venir à Montréal mais qui aimeraient beaucoup participer au 7^e TAKE. Nous vous invitons à faire un don, même minime, pour soutenir la venue d'espérantophones de Cuba, du Brésil ou d'ailleurs. Un don (de 20 \$, 50 \$, 100 \$...) multiplié par 10, 20, 50 membres de la SQE, nous permettra d'inviter plusieurs participants latino-américains qui enrichiront le programme du congrès par leur participation (concert, conférence, etc).

Si vous ne pouvez assister au congrès, nous vous invitons quand même à faire un don solidaire. Vous n'avez qu'à utiliser le formulaire d'inscription en ne complétant que la section concernant un don. Nous vous remercions sincèrement à l'avance.

PS Nous sommes activement à la recherche de financement pour le congrès. Si vous connaissez des sources, nous vous prions de nous les communiquer. Mille mercis !

Francisco Franco kiel honora prezidanto?!

Ferriol Macip

La hispana diktatoro Francisco Franco estis, nekredeble, honora prezidanto de la 53^a Universala Kongreso de Esperanto dum la jaron 1968.

Grupo da homoj, viktimoj kaj viktimidoj de la frankisma diktaturo en Hispanio, lanĉis premkampanjon por ke la koncerna societo nuligu tiun honoran prezidantecon, pro homa digno.

Se vi, samkiel ni, opinias ke estas honto por la esperantista komunumo honorigi faŝisman diktatoron kiel prezidanton de Universala Kongreso, ne hezitu subskribi. Eblas aliĝi al la manifesto kaj unuopule kaj nome de organizo.

Legu la manifeston kaj subskribu, kaze de konsento, ĉe www.homadigno.net/

Ni petas vin, ankaŭ, disvastigi la kampanjon.

Kie vivas Avo Frosto?

Normand Fleury

Saviez-vous que le Père Noël a appris l'espéranto en 2002 ? Depuis cette année-là, il répond aux lettres des enfants en 26 langues dont l'espéranto. En 2006, plus de 11 000 employés des Postes ont répondu pendant leurs temps libres à plus d'un million de lettres du monde entier et à plus de 40 000 courriels. Si vous aimeriez en recevoir une, utilisez l'adresse qui figure au bas de cette article.

Nu, facilas respondi al tio, kompreneble en Kanado, ĉar la norda poluso troviĝas en Kanado. Mi rakontu al vi, kio okazas al la leteroj kiam la infanoj de la mondo skribas al Avo Frosto.

Antaŭ 33 jaroj, tri deĵorantoj en la komunikada departamento de la Kanada Poŝta Servo malgajiĝis vidante, ke la leteroj senditaj al Avo Frosto simple amasiĝas vane ĉar

Avo Frosto ne havis veran adreson. Oni simple detruis ilin ĉar oni ne sciis al kiu sendi ilin. En 1974, tiuj tri deĵorantoj decidis respondi al la leteroj por pravigi la magion de la jarfinaj festoj. Postan jaron, pli da leteroj alvenis, tiel ke la triopo petis helpon de pliaj kolegoj por respondi la leterojn.

La tuto ekkreskis rapide kiel neĝpilko kiu ruliĝas laŭ deklivo ! Do, post kelkaj jaroj centoj da oficistoj de la Kanada Poŝta Servo kunlaboris kaj en 1983 la Poŝta Servo oficialigis la servon tutlande kun oficiala adreso kun poŝta kodo. En tiu-ĉi jaro, alvenadis 290 000 leteroj.

Ĉirkaŭ 11 000 oficistoj en 2006 helpis dum la tagmeza paŭzo aŭ restis

post la laboro por respondi al pli ol miliono da leteroj (1 063 187). En Kebekio, pli ol 2 000 koboldaj oficistoj respondis al 260 000 leteroj. La helpantoj de Avo Frosto respondas ankaŭ rete al la infanoj kiuj skribas uzante komputilon, pli ol 40 000 retleteroj dum pasinta jaro.

***Laŭ niaj statistikoj,
Avo Frosto manĝas
po du milionojn da
spicaj kuketoj jare !***

Necesas aldoni ke estas tre grave skribi revenadreson ĉar bedaŭrinde, pro sia aĝo, Avo Frosto ne ĉiam memoras la adreson de ĉiuj infanoj en la mondo.

La magio de Kristnasko agante, la leteroj nun alvenas el la tuta mondo kaj en plej diversaj lingvoj. Fakte, estas nekredebla fenomenon ĉar la Kanada Poŝta Servo ne reklamas tion eksterkanade.

Se vi interesiĝas scii kion la infanoj petas, nu, kompreneble ludojn kaj ludilojn dirante ke ili bone agis dum la jaro kaj malofte kverelis kun la gefratoj kaj obeis la gepatrojn. Multaj infanoj mencias, ke ili ordigas sian liton matene kaj lavas siajn dentojn vespere. Ili kompreneble atentigas Avon Froston ke ili translokiĝis al nova domo, tiel ke Avo Frosto ne erare portu iliajn donacojn al aliaj infanoj. Ankaŭ estas demandoj al la maljunulo kiel: Kiom vi aĝas ? Kiel vi sukcesas iri tra la fumtubo? Kiom peza vi estas ? Kion vi faras somere ? Kaj multe pli.

La Kanada Poŝta Servo konsideras,
(sekvo al la 7^a paĝo...)



Oficejo de la koboldoj

Une orthographe inspirée de l'espéranto

Mario Périard

L'orthographe française est fixée de manière officielle par l'Académie française. On pourrait croire que ces doctes personnages se sont dit: « *Pourquoi faire simple quand on peut faire compliqué?* » et on ne serait pas loin de la vérité. L'académicien Mezeray a même parlé, pour la préface du dictionnaire de l'Académie, d'une orthographe pour « *distinguer les gens de lettres d'avec les ignorants et les simples femmes* ».

L'espéranto en tant que tentative de rationaliser la langue a été une inspiration avouée pour au moins un des projets de rationalisation de l'orthographe française, la norme *Ortograf*, qui remet en question la prééminence de l'orthographe fixée par l'Académie française.

Le mouvement *Ortograf.net* propose une orthographe normalisée, rationalisée et plus phonétique. Le code proposé est similaire à l'*Ortograf altêrnativ* qui est déjà utilisée avec succès pour donner un minimum d'autonomie en lecture et en écriture à des gens qui n'auront jamais accès autrement à l'écrit, en raison de déficiences importantes. La ville de Montréal offre depuis peu une version de son site en *Ortograf altêrnativ*.

Les supporters du groupe *Ortograf.net* considèrent que tous ont droit d'écrire simplement, que la langue française appartient à ses locuteurs et que si ceux-ci adop-

tent une manière simple de l'écrire et la propagent, cette norme s'imposera d'elle-même. L'administration, le système d'éducation et la société en général finiront par devoir s'ajuster.

Le mouvement appelle donc la population à prendre possession de sa langue en s'appuyant sur une norme simple et précise, plutôt que d'attendre vainement et passivement une «réformette» partielle de l'orthographe venant d'une quelconque autorité.

Ortograf.net suggère d'agir en écrivant phonétiquement dès maintenant, en faisant suivre chaque correspondance de la note *J'adêro standar de l'ortograf altêrnativ* - *www.ortograf.net* qu'on retrouve sur son site. Cette stratégie a permis à la norme de se propager rapidement depuis 2006. Il s'agit de la norme alternative en plus forte progression actuellement.

Cette orthographe n'est pas sans rappeler l'*Alfonic* conçu par André Martinet dans les années 1970 pour offrir à de jeunes apprenants ou à des étrangers, inhibés par la crainte de faire des fautes, un outil leur donnant le moyen de surmonter cette crainte et de laisser libre cours à leur expression.

On pense bien sûr aussi au langage SMS qui modifie les caractéristiques orthographiques voire
(suite à la page 10...)

Kie vivas Avo Frosto? (sekvo...)

Normand Fleury

(*sekvo de la 6^a paĝo...*)

ke tiu servo estas eduka por la infanoj. Ili lernas skribi sian unuan leteron, afrankigi ĝin kaj atendi la respondon. Kelkaj infanoj estas tiom ekcivitaj ke ili ĉiutage senpacience atendas la alvenon de la poŝtisto.

Ekzistas du diversaj versioj de la leteroj kaj oni provas sendi malsamajn leterojn kiam oni rimarkas ke samfamiliaj infanoj skribis samtempe. Estas ankaŭ postjarfina versio por respondi al la leteroj, kiuj alvenis tro malfrue.

Oni ĉiam provas respondi en la devena lingvo kaj en 2007 estas pretaj versioj en 26 lingvoj kiel la angla, franca, hispana, portugala, itala, inuka, germana, japana, rusa, rumana, hungara, greka, ĉeka, vejtnama, litova, ukraina, araba, ĉina, armenia kaj esperanta. Eblas respondi brajle kaj en aliaj lingvoj laŭnecese. Do, ekde 2002 Avo Frosto lernis Esperanton.

Se vi ŝatus ankaŭ vi provi aŭ konas infanojn kiuj parolas Esperanton, ne hezitu skribi al :

Avo Frosto
Norda Poluso
Kanado / Canada
H0H 0H0

Raportis post intervjuo kun kobloda estrino de la servo kaj vizito de la laborejo de Avo Frosto Normand Fleury

Une orthographe inspirée de l'espéranto (suite...)

Mario Périard

(suite de la page 7...)

grammaticales du français afin de réduire sa longueur, dans le but de diminuer la durée requise pour composer l'énoncé ou afin de réduire sa longueur en deçà du seuil maximum imposé pour les messages SMS sur portable.

Certains vont plus loin et proposent la création d'un alphabet phonétique français: l'*alfograf* (alphabet phonétique français du

mouvement *ortograf.fr*).

Comme pour l'espéranto, ces tentatives pour rendre davantage accessibles l'expression et la compréhension, se heurtent aux mêmes réactions et accusations: « *C'est artificiel et mécanique, c'est une trahison de notre histoire et de notre culture, ce n'est pas viable, c'est difficile, je l'apprendrai quand tous le monde l'apprendra...* »

Les langues : Un défi

Claude Piron

Ĉu vi scias pri la serio de dekminutaj franclingvaj videoprogramoj kun la titolo « *Les langues : Un défi* », en kiuj mi laŭgrade kondukas la spektanton al la solvo « Esperanto »?

La titoloj estas jenaj:

- | | |
|---|--|
| 1. <i>Se comprendre</i> | 6. <i>Les langues, ça coûte</i> |
| 2. <i>La diversité des langues</i> | 7. <i>La peur du réel</i> |
| 3. <i>Le handicap linguistique</i> | 8. <i>Le fonctionnement du cerveau</i> |
| 4. <i>Instances internationales</i> | 9. <i>Programmation génétique</i> |
| 5. <i>Passer d'une langue à l'autre</i> | 10. <i>La solution.</i> |

Nur en la deka Esperanto estas menciata. Ili estas videblaj sur Youtube. Oni povas iri al www.youtube.com/dannirlsne aŭ al mia retejo <http://claudepiron.free.fr/> kaj elekti « Audio et vidéo » en la maldekstra menuo. La unuopaj elsendoj estas listigitaj fine de la paĝo, kiun oni tiel atingas, kaj oni tiam alklaku la deziratan programon.

Aliĝu al la Universala Esperanto-Asocio

Sylvain Auclair

Dum via kara Esperanto-Societo Kebekia agadas por Esperanto-loke, en Kebekio, la tutmondan Esperanto-movadon gvidas la Universala Esperanto-Asocio. Eldonanta la tutmondan revuon *Esperanto*, ĝi ankaŭ organizas la jarajn *Universalan Kongreson kaj Internacian Junularan Kongreson*, reprezentas la Esperantistaron ĉe internaciaj organizaĵoj kaj klopodas disvastigi Esperanton en tiaj landoj, kie malfortas aŭ tute mankas landa movado.

Por aliĝi al UEA, vi devas pasi tra ĝia kanada peranto:

Sinjorino Olga Du Temple
765 Braemar Ave.
North Saanich BC V8L 5G5
esperanto@shaw.ca

La plej baza kotizo, por kalendara jaro 2008, estas 14 \$. Kontraŭ tiu prezo, oni ricevas nur maldikan sed utilan *Gvidlibron tra la Esperanto-Movado*. Kontraŭ 34 \$, oni ricevas la pli dikan kaj informplenan *Jarlibron* (kies unua parto konsistigas la *Gvidlibron*), kaj junuloj ĝis 29 jaroj ricevas sen plia pago la revuon *Kontakto*, kiu por «maljunuloj» kostas 31 \$-jn. Abonon al la monata revuo *Esperanto* kromkostas 52 \$-jn.

Plian informon trovu ĉe www.uea.org

Franca skribo inspirita de Esperanto

Mario Périard

La franca ortografio estas decidita en oficiala vojo de La franca Akademio. Oni povus kredi ke ĉi tiuj diris al si: « *Kial fari simple kiam eblas komplike?* » kaj ni ne estus for de la vero. La akademiano Mezeray eĉ parolis, en antaŭparolo al la vortaro de la akademio, pri ortografio « *por distingi la klerulojn disde la nekulturitoj kaj disde simplaj virinoj* ».

Esperanto, kiel provo raciigi la lingvon, estis agnoskita inspiro de almenaŭ unu projekto de raciigo de la franca ortografio, la normo Ortograf , kiu kontraŭas la superecon de la ortografio decidita de la franca Akademio.

La movado *Ortograf.net* proponas ortografian normon raciigitan kaj pli fonetikan. La sugestita kodo similas al *Ortograf altêrnativ*, kiu estas jam sukcese uzata por doni minimuman memstarecon en legado kaj skribado al tiuj, kiuj neniam havus aliron al la skribo pro gravaj mankoj. Urbo Montreal lastatempe proponas version de sia retpaĝaro en *Ortograf altêrnativ*.

La aliĝantoj al la grupo *Ortograf.net* konsideras, ke la franca lingvo apartenas al siaj parolantoj kaj ke se tiuj adoptus kaj disvastigus simplan manieron skribi ĝin, ĉi tiu normo mem trudiĝus. La administro, la edukadsistemo kaj la ĝenerala komunumo adaptiĝus. La movado tiel invitas la publikon ekposedi sian lingvon baze de simpla normo anstataŭ vane kaj pasive atendi par-

tan reformeton de la ortografio per iu aŭtoritato.

Ortograf.net sugestas agi, fonetike skribante ekde nun, aldonante al ĉiuj korespondaĵoj la jenan noton: *J'adèr o standar de l'ortograf altêrnativ* - www.ortograf.net kiu troviĝas sur la retpaĝo. Ĉi tiu strategio ebligis la normon rapide disvastiĝi ekde 2006. Temas pri la alternativa normo en plej forta progreso aktuale.

Ĉi tiu ortografio memorigas al *Alfonic*, konceptita de André Martinet en la 70^{aj} jaroj kiel propono al lernjunuloj aŭ fremduloj, malhelpitaj pro timo erari, doni ili la rimedon venki tiun timon kaj liberigi ilian esprimadon.

Oni pensas ankaŭ al lingvaĵo de SMS, kiu modifas la gramatikan kaj ortografian karakterizaĵojn de la franca lingvo kun celo malpliigi la necesan tempon tajpi komunikaĵon aŭ por redukti longecon sub sojlo trudita por SMS-mesaĝoj sur poŝtelefono. Iuj iras eĉ pli for kaj proponas kreon de franca fonetika alfabeto: *Alfograf* (franca fonetika alfabeto de la movado *ortograf.fr*).

Same al Esperanto, ĉi tiuj provo igi esprimon kaj komprenon pli alirebla, kolizias kun la samaj reagoj kaj akuzoj: « *Estas artefarita kaj mekanika, estas perfido al nia historio kaj kulturo, ne estas realigebla, estas malfacile, mi lernos ĝin kiam ĉiuj lernos ĝin...* »

Riveroj sen akvo / sekvoj de barlagoj

Asocio de verduloj esperantistaj

Multaj riveroj estas uzataj por agrikulturo kaj aliaj celoj, tiom ke ili ne plu, aŭ preskaŭ ne plu atingas la maron. Nur kelkaj ekzemploj: en Hispanio (Ebro), P.R.Ĉinio (Flava Rivero), Israelo/Jordanio (Jordano), Uzbekio (Syr-Darya, suda Aral-Mar), Egiptio (Nilo).

La problemoj estas la jenaj: Se temas pri enlandaj maroj/lagoj, tiuj trosaliĝas kaj malaperadas, kun granda perdo de la biodiverseco.

Se ili fluas en la maron, la maro enmigras en la deltaon kaj eĉ en la landon (saligas la grund-akvon), kaj pro la manko da fluanta akvo la sedimento ne plu atingas la maron, sed altigas la river-bedon kun la sekvo de pli severaj inundoj.

(*Jordano: laŭ BUNDmagazin 2007/4, BUND = Ter-Amikoj en Germanio, kiu organizas vojaĝon al la Jordano, tie ankaŭ pro viziti alternativajn projektojn*)

(*Flava Rivero: laŭ Nick Reimer, taz, 2007-11-20*)

7^a TAKE en Montrealo, en Julio de 2008

Boris-Antoine Legault

Aliĝu tuj ĉe www.take7.ca

De la 12^a ĝis la 18^a de Julio 2008 okazos en Montrealo la plej grava Esperanta renkontiĝo de la jardeko en Norda Ameriko : La Sepa Tutamerika Kongreso de Esperanto (7^a TAKE). Tiu kongreso estos belega ebleco por Kebekiaj Esperantistoj utiligi Esperanton en internacia kaj interkultura etoso. La temo traktota estas inter la plej aktualaj kaj interesaj: ni diskutos kiel diversecoj ekosistema, lingva, kaj kultura povas helpi al daŭrpova evoluigo en la Amerikoj (kaj ankaŭ

tutmonde). Estos ne nur lernigaj prelegoj, diskutrondoj kaj kursetoj, sed ankaŭ buntaj ekskursoj kaj amuzaj spektakloj, bankedo, kaj turismaj vizitoj antaŭkongresaj kaj postkongresaj !

Tiu spertenda evento estas ankaŭ okazo por ni videbligi en la socion nian projekton por pli demokratia kaj ĝusta tutmonda komunikado. Ni ja bezonegas vian entuziasman engaĝigon kaj invitas vin kontribui, laŭ viaj intereso kaj kapabloj, al sukcesigo de 7^a-TAKE !

7e TAKE à Montréal, juillet 2008

Boris-Antoine Legault

Inscrivez-vous dès maintenant sur le site www.take7.ca

Du 12 au 18 juillet 2008 aura lieu à Montréal la plus importante rencontre d'espéranto de la décennie en Amérique du Nord : le septième Congrès d'espéranto des Amériques (7^e TAKE). Cette rencontre constitue pour les espérantophones du Québec une excellente occasion d'utiliser la langue dans un contexte international et interculturel. Le thème du congrès vous intéressera certainement: nous discuterons de l'importance de la diversité des écosystèmes, des langues et des cultures, dans une perspective de développe-

ment durable dans les Amériques (et ailleurs dans le monde). On retrouvera bien sûr des conférences et discussions, mais aussi des excursions variées, des spectacles divertissants, un banquet ainsi que des visites touristiques précédant et suivant le congrès.

Cet événement à ne pas manquer nous donnera également l'opportunité de mieux faire connaître notre projet pour une communication plus démocratique et équitable. Nous avons grandement besoin l'implication des espérantophones et amis de l'espéranto du Québec: aidez-nous dès maintenant à faire de ce congrès un grand succès!

Google nun serĉas esperante

Marek Blahus

Ĉu vi rekonas la vortojn « kaj estas », eventuale « kaj la estas »? Jes, ilin oni uzis en serĉiloj kiel Google aŭ Yahoo kiel aldonon al la efektive serĉata esprimo, por elfiltri el la tuta reto nur la esperantlingvajn paĝojn kaj en tiuj serĉi.

Ekde kelkaj monatoj tamen, tiaj vortoj ne plu estas necesaj, ĉar Google decidi aprezi la Esperantokomunumon, aldonante Esperanton kiel unu el la lingvoj laŭ kiuj eblas filtrigi la rezultojn de serĉo. Atentu, ke ne temas pri la ebleco vidi la retpaĝaron de Google en Esperanto! - tio jam eblas ekde longa tempo kaj da tiaj lingvoj estas pli ol cent.

La nova decido de Google envicigas Esperanton inter nur 43 lingvojn, al kiuj eblas limigi la rezultojn de efektivigata serĉo. Tial la robotoj de Google nun trairante la reton aŭtomate rekonas retpaĝojn skribitajn en Esperanto kaj dum serĉado ebligas al la uzanto serĉi nur ene de ili. Saman pozicion kiel nun Esperanto ankoraŭ ne havas en Google tiom grandaj lingvoj kiel la hinda, la bengala, la latina, la afrikansa, aŭ la svahila. Cetere, Esperanto estas la sola artefarita lingvo tiel agnoskita.

Por serĉi per Google nur esperantlingvajn paĝojn, uzu la adreson: www.google.com/intl/eo/ kaj krucu « *serĉu paĝoj pri esperanto* ».



BOTANIKEJO



SUNOCIRKO



OLIMPIKEJO



METROARTO

7a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE7) 12a–18a de julio 2008, Montrealo, Kebekio, Kanado



Tutamerikaj kongresoj celas progresigi la esperantan movadon en Ameriko kaj plifortigi solidarecon inter esperantistoj el Norda, Centra kaj Suda Ameriko. TAKE tradicie havas allogan etoson kaj riĉan programon. Partoprenas ĝin esperantistoj ne nur el amerikaj landoj, sed ankaŭ el pluraj aliaj mondopartoj. Do jen invito al vi partopreni en la sepa Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE7) okazonta ĉe ni en Montrealo venontjare.

TAKE7: Kongresa temo

Ekosistemoj, lingvoj, kulturoj:

diverseco por daŭropova evoluigo en la Amerikoj

La programo de TAKE7 similos al la programo de aliaj esperantujaj kunvenegoj per sia duobla karaktero: jen programeroj distraj, sociumaj, turismaj kaj jen programeroj seriozaj, problemorientitaj. Programa duflankeco tamen ĝenerale nur ŝajna en TAKE7. Eĉ pluraj *distraj* programeroj (notinde artaj vesperoj kaj urbaj vizitoj) estos fakte samtempe amuzaj kaj klerigaj, riĉigante la *seriozan* traktadon de la kongresa temo, gravega por ni ĉiuj. Por pli bone kompreni tiun ĉi temon kaj ties praktikan signifon por ni, ankaŭ kiel esperantistoj, helpos nin, krom prelegoj kaj aliaj prezentaĵoj de fakuloj, aro da diskutaj kaj studaj eventoj (*praktikumo*), kies unu rezulto estu bone fondita komuna kongresrezolucio.

Montrealo: Gastiganto de TAKE7

Mondurbego multkultura kaj multlingva, tre ekologie orientita, Montrealo aparte taŭgas por TAKE7 kaj ties temo. Situante kerne de pli-ol-200-insula arĥipelago en la riverego Sankta-Laŭrenco, ĝi ilustras ne nur kulturan kaj lingvan diversecon, efektive respektante la devizon **DIVERSECO EN UNUECO**, sed ankaŭ diversecon ekologian. Nordamerika urbego francakĉenta, unu el la tri *internaciaj urboj de dezajno* de Unesko, Montrealo havas atutojn aprezatajn de multaj ĝiaj diversoriginaj vizitantoj kaj... loĝantoj. Ravas ĝia latineco, ravas ĝia malfermiteco al la fremdo, ravas ĝia kultura bunto multkvartale spertebla. Tutjare kaj precipe nordhemisfersomere ĝi vibras feste: kelkaj grandaj festivaloj kaj strataj eventoj tre ĝuindaj okazos efektive tuj antaŭ, dum kaj post TAKE7!



Bonvenigas vin al Montrealo la LKK de TAKE7. Detalojn ĉe www.take7.ca.

Montrealaj Esperanto-kunvenoj (MEK)

DATO	KIE	HORO	TEMO
ven. 30 ^a nov. 2007	MEDO **	19 h	Teo
sab. 15 ^a dec. 2007	Commensal *	18 h	Decembra Festo
ven. 25 ^a jan. 2008	MEDO **	20 h	Bildstrioj
ven. 29 ^a feb. 2008	MEDO **	20 h	Kuirarto & kuirado
ven. 28 ^a mar. 2008	MEDO **	19 h	Radio-elsendoj
ven. 25 ^a apr. 2008	MEDO **	18 h	Poezio
ven. 30 ^a maj. 2008	MEDO **	19 h	Diskuto pri la 7 ^a TAKE
ven. 27 ^a jun. 2008	MEDO **	19 h	7 ^a TAKE preparado
12-18 jul. 2008	Montrealo		Tut-Amerika Kongreso de Esperanto

* **Restoracio Commensal** : 1720, rue Saint-Denis, Montréal, Métro Berri-UQAM

** **Montreala Esperanto-Domo (MEDO)**: 6358-A rue de Bordeaux, Montréal

Entre Papineau et De Lorimier.

Métro Beaubien, Autobus 18 Beaubien Est

Voir le site web pour un plan d'accès : www.esperanto.qc.ca

19 h *Horo por komencantoj, lernado, konversacio, demandoj pri la movado.*

Heure pour les débutants : conversation, questions, grammaire...

20 h *Anoncoj, libera babilado, libro - pruntado kaj - aĉetado, aliĝo al ESK.*

Annonces, emprunt ou achat de livres, de revues, adhésion à la SQE.

20 h 30 *Tema programo, diskuto, kvizo, ludo...*

Programme thématique, discussion, quizz, jeux...

Por komentoj, proponoj, demandoj : informo@esperanto.qc.ca

Kaj?

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto et un regroupement de club espérantistes. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego@esperanto.qc.ca...

Club d'espéranto de l'UdeM: udem@esperanto.qc.ca Club d'espéranto de l'UQAM: uqam@esperanto.qc.ca

M^cGill Esperanto Club: mcgill@esperanto.qc.ca

MEMO, Montreala Esperanto-Movado : www.esperanto-montreal.org